★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Milíč el Kroměříž

Preskaŭ ĉiuj loĝantoj de Ĉeĥa Respubliko scias, kiu estis Magistro Johano Hus (1371? – 1415), sed nur malmultaj el ili scias liajn antaŭulojn. Sopiro pri rebonigo de morale deklivanta romkatolika eklezio manifestiĝis jam longtempe antaŭ alveno de Hus. Moravia predikanto Milíč el Kroměříž naskiĝis en la unua kvarono de la 14a jarcento (1325?). Pri lia infanaĝo ni scias nenion. En la jaro 1358 li jam estis reĝa kanceliero kaj post pastriĝo en la jaro 1361 li fariĝis kanoniko kaj baldaŭ ĉefdiakono. Li povis vivi kiel riĉulo, sed danke al aŭstra aŭgustiniana predikanto Konrad Waldhauser (1325? – 1369) li eksciis, kiel malbona estis tiama socio, kaj radikaliĝis. En la jaro 1363 li rezignis sian rangon kaj fariĝis eĉ pli radikala predikanto ol Waldhauser. Li ellernis germanan lingvon. Sed rebonigon de tiama socio li unue komencis kiel rebonigon de sin mem. Li estis strikta asketo, sed kvankam sia vivo en malriĉeco li majstris eksterordinaran talenton helpi al aliuloj. En Prago li fondis rifuĝejon por malĉastulinoj, kiuj pentofaris kaj eĉ kapablis ŝanĝi sian vivstilon. Predikante latine, ĉeĥe kaj germane Milíč kritikis moralan deklivon de eklezio, uzuron, luksan vivon de riĉuloj, almozajn monaĥajn ordenojn kaj multprebendismon. Li havis multe da malamikoj, kiuj lin ofte akuzadis pri herezeco, sed junularo lin amis. Purigonte sin de akuzo pri herezeco, li foriris en Avinjonon, sed baldaŭ tie mortis (1374). Humanisto Přemysl Pitter (1895 – 1976), kiu Milíč-on tre admiris, en la jaro 1933 en Prago konstruis Domon Milíč por infanoj el malriĉaj familioj.ŝ

**Lingvo:** Esperanto

**Prelegonto:** Oldřich Arnošt Fischer

**Kiam:** la 5an de marto 2025 je la 18.00-a h (la klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

La renkontiĝo estos registrata.

★

## Ni rekomendas

- La 18an — 27an de aprilo 2025 Printempas (kursoj de Esperanto, Greziljono, Francio)
- La 9an — 11an de majo2025 Aŭstria Esperanto-Kongreso 2025 (Graz, Aŭstrio)
- La 5an — 13an de julio 2025 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Kaunas, Litovio)
- La 19an — la 26an de julio 2025 58-a ILEI-KONGRESO (Beogrado, Serbio)
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno.
- **Trapasu KER ekzamenon** en Brno. Ĉiuj eblaj niveloj (de B1 ĝis C2)

★

## Cetera programo en marto

La 12-an *Ankoraŭ ne agordita*, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom
La 19-an *Ankoraŭ ne agordita*, klubejo
La 26-an aŭ 29-an Interlingvitikaj studoj, rete per Skajpo

Mi petas vin, ke vi jam primensu programon por marto kaj aprilo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Koran dankon.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)